

NOVA SENTO



ESPERANTA
GAZETO DE
BILBAO

ORGANO DE LA
VASKA ESPERAN
TISIANO



APERAS ĈIUMONATE

2.^a Jaro



Numero 9.^a

MARTO 1910^a

ENHAVO

«Malnova Sento»—Vortludo dedikata al la Legantinoj de NOVA SENTO.—NOVEJARQUE (Angelo).
Rakonto de migranta hajlero.—JUAN ZAVALA.
Sur la fundo.—El la pola originalo tradukis.—HELENA HEMPEL.

Esperantigu la infanojn.—J. ECHEVARRIA,
Pason al progreso!—FRANCISCO DE BILBAO.
Paco —Al D-ro Zamenhof. RICHARD SAUREN.
En la tramvojo.—(El Gil Parrado en Madrid'a ilustrita re-
vuo «Blanco y Negro»)—VELASCO.

La krimuloj punitaj de si mem.—F. REPARAZ.

Hispanaj tipoj—La Madridino.—VIRGILIO

Komerca Rigardo—V.

La Miraklo—TOMAS ARAMBIET.

Bibliografio.

Diversaj sciigoj.

Veroj kaj mensogoj

Anoncoj


UNU NUMERO 0,15 PTOJN.

REDAKCIO &

ADMINISTRACIO

STRATO JARDINES, 7

BILBAO (Hispanujo)



“MALNOVA SENTO”

VORTLUDO ^A **dedicata al la LEGANTINOJ de “NOVA SENTO”**

I

Radikvorto el verbo TRE UZATA DE LA HOMARO KAJ MULTFOJE NE BONE KOMPRENATA	SUFIKSO (TIO, KIO NI DEVAS ESTI JE NIAJ BONAĴ AGOJ)	SPRITA SUFIKSO	KARAKTERIZA ESPERANTA FINIĜO
--	--	-----------------------	--

II

KARAKTERIZA ESPERANTA FINIĜO	PERSONA PRONOMO	GRAMATIKA KAZO ESPERANTA	NUMERALO LA SAMANTAŬA PERSONA PRONOMO
--	---------------------------	------------------------------------	--

III

INFINITIVO EL LA VERBO ESPRIMITA EN LA I	KONSONANTO	PREPOZICIO (INTERTEMPE)	VOKALO
---	-------------------	-----------------------------------	---------------

ĈU NE ESTAS VERO KE LA TRI ENIGMOJ (I-II-III) ŜAJNAS ESPRIMI TRI **DIVERSAJN VORTOJN?**
 NU, NENIO PLI MALVERA! LA TRI ENIGMOJ ESPRIMAS LA **SAMAN VORTON**, KIU ESTAS:

INFINITIVO EL VERBO TRE ŜATATA, PRECIPE ĈE LA VIRINA MONDO, KVANKAM ĜI, JA
 ESTAS **MALNOVA SENTO!**

Rakonto de migranta hajlero.

Promenante antaŭ kelke da tagoj apud la rivero *Nervion*, mi alvenis frumatene en lokon nomatan «Paseo de los Druidas» (Promenejo de la Druidoj), kies flankojn limigas du altaj muroj, donante al la mallarĝa enirejo poezian aŭ malgajan aspekton, laŭ tio ke la promenanto estas bon-aŭ malbonhumora.

Apenaŭ mi faris kelkajn paŝojn en tiu promenejo kiam la plej stranga, miriga vidaĵo ŝajnis bari al mi pluan iradon. Hela, travidebla nebuleto en homa formo kaj aroganta sintenado svingis antaŭ mi la brakojn.

Mi tuj komprenis ke ĝi estas suferanta animo, kiu eble lasis en tiu ĉi mondo ian nesalditan kalkuleton, kaj deziras vivulan helpon por liberiĝi de la suferoj, kaj demandis al ĝi «al kiu mortinto ĝi apartenas kaj kion ĝi deziras».

Jen proksimume la respondo kiun mi aŭdis:

«Mi naskiĝis en alta regiono; kaj, kvankam mia patrino estis tiel mola kaj malpeza kiel la aero, kaj mia patro, libera de ĉiu materio kvazaŭ spirito, mi naskiĝis tiel malmola kaj peza kiel ŝtono. Elektro kaj vapore estis miaj gepatroj; malvarma aero, mia naskejo; fulmo kaj tondro, la atestantoj; terura ventego, mia lulanto. Ĉu oni povus esperi paceman anĝelon de tiaj diversnaturaj genaskantoj? Ĉu trankvileco povus loĝi en tiel malkvieta, senorda loĝejo? Ne amo prezidis mian naskiĝon, sed ribelo kontraŭ naturo. Ĉe mia naskiĝo, la mortiga fajro de mia patro kaj la surdigaj blekegoj de doloro de mia patrino tian teruron disjetis en la vastan ĉirkaŭaĵon, ke la ĉielo tremis kaj ĉiu vivulo sur la tero forserĉis rifuĝejon por sia timego.

»De la komenco de mia vivo, mia ribelema naturo montris sin en sia plena krudeco. Apenaŭ mi konsciiĝis pri mia esteco kiam mi ellasis mian «non serviam» kun fiereco kiun Luzbel envidis. Milionoj da fratoj respondis al mia ribelkrio per sia sensimila, grandioza, olimpa krakado, kiun ili elbruis ĵetante sin unuj kontraŭ la aliaj, kiel furioj al kies rabiego mankas inda, atingebla celo.

»Granda peko meritas grandan punon; kaj ni, kiel la anĝeloj ribelintaj kontraŭ Dio, estis kondamnitaj en la abismon.

»La granda malamo al ĉiu kreaĵo montris al ni la plej mallongan vojon, kaj ni ekĵetis nin

rekte al kampo plena je greno; sed subite ni vidas malsupre en portiko de preĝejo pastron en blanka surplizo svingante krucon dum li krias per la tuta forto de sia brusto «ecce lignum crucis... ipse vobis imperat... fugite partes adverse»... kaj nekontraŭstarebla forto detenas nin. Ni rigardas ĉiuflanken, kaj ĉiuflanke ni vidas preĝejon kaj pastron en sama sintenado, kriante samajn preĝojn kun egala fervoro. Kion fari? Jen ni vidas en malproksima, alta ebenaĵo rondon de nudaj, malgrasaj, brunaj, sulkoplenaj virinaĉoj dancantaj ĉirkaŭ malbela kaprego. Ni rapide turnas nin al la *Akelarro*; kaj post duono da minuto la *ŝatindaj* sorĉistinoj, *graciaj* fiedzinoj de la kapra moŝto kuŝas sur la tero preskaŭ senvivaj. Eĉ ne restis al ili forto por grati al si la travunditan haŭton. Tiel surprize ni falis sur ilin, ke ili ne havis tempon por repreni la balailojn; kaj sorĉistino sen balailo estas kvazaŭ soldato sen armilo. La kornulo ricevis ankaŭ sian parton. Li restis unuokula, kaj la mizerulo longe ploris siajn *kompatindajn belulinojn*, vagirante tra la montoj, ĉar li hontis prezenti sin al siaj fratoj, la satanidoj, tiel difektita.

»Mi sentis min fiera pri la unua leciono, kiu promesis al mi grandajn sukcesojn en la estonto; sed ĉu mi estas mia mastro? Baldaŭ mi konstatis: unue, ke mia supraĵo pli kaj pli malsekiĝas; poste, ke iom post iom mia tuta estaĵo fluidiĝas kaj fine, ke mi ne estas plu malmola ŝtono sed nur pura akvo.

»Estas ĝustatempe ke mi diru por klarigi la kaŭzon de mia konstanta individueco, ke kiam mi prembatis la okulon de la kapro-diablo, ĝi ellasis guteton de oleo, kiu envolvis min kiel membrano. Dank al tiu ĉi ŝirmilo, kiu distiriĝas aŭ kuntiriĝas laŭbezzone, tio estas, laŭ tio ke mi okupas pli aŭ malpli vastan amplekson, mi povis ĉiam konservi mian personecon. Ĉu en solida, ĉu en fluida, ĉu en gasa stato, mi ĉiam restis izola; ĵem kiel akvo, meze de l' oceano; ĵen kiel ŝtono. sur la tero; ĵen kiel vapore, en la vasta atmosfero. Sed ni revenu al niaj ŝafoj; tamen sembedaŭro, ĉar tiu ĉi deflankiĝo neniel estas senutila. Kontraŭe, ĝi kunhelpas la ekzaktecon de mia rakonto.

»Kaŭze de la inferolea tegilo, malplipeza ol akvo, kaj, obeante al la eterna leĝo ke fluidaĵo pli malpeza okupu la superan lokon, mi post momento troviĝis en la supraĵo de malvasta lageto, produkto de nia fluidiĝo. Sed la eco kiu

min pleje karakterizas estas la ŝanĝemo, kiu devigas min al senĉesa aliformiĝado. Tial mi havas neniam definitivan formon kaj tial la ĵusakirita devis daŭri nur momenton por cedi lokon al alia. La fajraj radioj de julia suno daŭris en sia laboro, kaj baldaŭ mi sentis min suprentirata aŭ suprenpelata de mistera forto. En kelkaj minutoj mi pasis tra la statoj solida kaj fluida kaj komencis gasiĝi.

»Mi, en la komenco nevidebla konusa ŝveleto sur la supraĵo de la akvo, levis la kapon malrapide al la nuboj ĝis mi atingis post kelke da tempo tian longecon ke mia korpo, ĉiam en sia ŝirmilo, kvazaŭis longega vermo kiu svingas la kapon en la ĉielo baraktante por liberigi la voston, kvazaŭ alkroĉitan al la tero.

»Sed baldaŭ mi vidiĝis libera en la aero kaj povis libere migri en la vasta mondo, ĉu ŝovante min sur la tero, ĉu observante ĝin de la supraĵo. La aventuroj kiujn mi travidis kaj travivis de post tiu tempo estas tiom multaj ke mil generacioj ne sufiĉas por elrakonti ilin.

»Sed ĉu la fakto ke ili estas multaj pravigus mian konduton kontraŭ via scivolemo, ne rakontante almenaŭ kelkajn el ili?.....

»Kiam mi forlasis la diablan templon kaj la mortvunditajn pastrinojn de la dio-kapro, komencis senĉesan kaj sencelan migradon, kaj troviĝis la morgaŭan tagon frumatene en valeto plena je arboj, deca kaj tute preta por idilio. Ĝi estis preskaŭ senluma kaŭze de la densa akvo-vaporo ĝin pleniganta, kaj apenaŭ oni povis ekvidi la objektojn je kelkaj paŝoj.

»Subite, mi ekvidis pajlan kabaneton kun malgranda pordo, kiu apenaŭ povus enlasi unu personon kaŭre. Por mi la enirejo estis oportuna, kaj mi enŝoviĝis internen sencere monie. La ŝirmejo, kiu povis enteni unu personon senĝene kaj du malgrasajn iom kumpremataj, ne estis senhoma. Ĝin okupis juna knabino, kies beleco, fortkeco kaj simpatia gajeco tiel frapis mian enviemon ke mi bedaŭris ne havi plu la unuan formon por forbati al ŝi unu okulon. Ŝia ruĝe-bruna vizaĝo, iom malglatigita de la suno kaj la aero, vidigis nekaŝeblan sanon, kiun ŝia tuta korpo dislasis tra ĉiuj *poroj* de sia haŭto. En sia malzorga teniĝo, sidanta sur la pajla planko kaj malpeze vestita, ŝi trikis ŝtrumpon, montrante sian belforman harmonian, nudan kapon kun la hararo pendanta en du plektaĵoj; la dikan bruston, duon nudan; la

rondajn brakojn kaj krurojn ĵuslavitajn en la proksima rivereto, dum la ŝafaro al ŝi konfidita paŝtis sin en apuda herbejo, montrante de tempo al tempo per siaj blekoj, sian paŝtlokon, por ke ilia bela mastrino restu trankvila pri ilia kvieteco.

»Mi havis mallongan tempon por elesplori la neoftajn ecojn de la ŝafistino, ĉar tuj post mia eniro, la malgranda pordo mallumiĝis kaj enlasis pafilon tenatan de blanka kaj glata mano, sekvatan de bela ĉasisto en kies senbarba, gaja vizaĝo kaj distingindaj trajtoj estis facile diveni riĉan nobelidon.

»Lia surprizo, ŝia konfuzo kaj la korpremo de ambaŭ nebligis ĉiun klarigan esprimon en la unuaj momentoj, kaj nur post kelke da tempo oni povis aŭdi jenan embarasan, mallongan dialogon:

—Leviĝu sinjoro. Vi surpremas min.

—Pardonu anĝelo. Ĝi okazis senintence; mi foriros.

—Ne. Vi povas resti. Ellasu min.

—Mi neniam pardonus al mi tian malĝentilajn. Vi estas la unua okupantino. Sed... ĉu estas nepra afero ke ni disiĝu? Malvasta loko sufiĉas al mi ĝis la pluvego ĉesos. Niaj unuaj gepatroj estis forpelitaj el la Paradizo nur kiam ili estis pekintaj.

—Ne! Ne! Lasu min foren. Estas peko ke ni estas tiel kunpremataj. Ellasu la manon; ĝi estas malglata, neŝanda je la via delikata.

—Mi malŝatas la ftizajn manojn de la urbuloj; permesu ke mi kisu ĝin.

—Vi mokas malkleran paŝtistinon; viaj lipoj alprenos ŝafodoron, kiu ne plaĉos al viaj urbuloj.

—Ne parolu al mi pri tiuj... vaks-statuo, indaj je fojra budo. Mi fordonus ilin ĉiujn por unu sola kiso de viaj lipoj.

—Ĉesu, sinjoro. Vi sufokas min, kaj viaj lipoj bruligas la vangon.

—Kial ĉesi, mia kara? Neniu vidas nin. En tiu ĉi aparta loko ni estas liberaj de la viperaĵoj de maljunaj enviuloj.

—Dio rigardas ĉien. Mi mortas de honto; ĉesu; lasu min foriri.

—Dio? Kiu, mia anĝelo, kunigis nin ĉi tie?

—Eble la diablo... Sendube ĝi enkondukis vin.

—Ĉu vi malamas min, mia amata diino?

—Ne! Ne!... Sed mi timas... mi timas... Ho! Ne rigardu min tiel! Kompatu min sinjoro!...

—Tie... en la urbo... vi havos luksan ĉambron... belajn vestojn...

—Ne! Ne!... Estas peko... Vi min malestimos... forlasos... poste.

»Mi ne povis alesti la finon de la sceno, ĉar la varmo radiita de la gejunuloj malplidensigis min, kaj mi estis devigata trairi fendeton de la pajla tegmento. Tamen la vojaĝo ne estis longa. Branĉaro de apuda arbo implikis min kaj liveris uovan observejon.

»Apenaŭ mi ekokupis ĝin kiam juna vilaĝano kun falĉilo en la mano, desaltis de arbo kaj alproksimiĝis kantante:

—Jen estas la ŝafaro

De mia belulin',

En mezo de l' arbaro.

Kie, nobla brutaro,

Sidas via mastrin'?

—Haltu! haltu, karulo,

Eĉ unu paŝon plu.

Ŝi sidas kun riĉulo,

Gaja, bela junulo.

Rigardu trans la tru'.

—Kion vi diras Lolo? Ĉu vi vidis Roson?

—Ha! ha! ha!... Jes. Mi vidis Roson... kaj ankaŭ... Ha! ha! ha!...

—Ŝajnas al mi ke vi ridas moke? Diru mallonge kie ŝi estas.

—Dio! Mi ĝin diris al vi. Sed... jen ŝi venas, Rigardu maldekstren. Ĝi estos la flanko de la pekuloj ĉe la lasta juĝo.

—Bonan tagon, Francisko. Mi ne atendis vin hodiaŭ.

—Bonan tagon, Roso. Mi surgrimpis pirujon por rikolti korbon da piroj, kaj de tie mi ekvidis vian brutaron, kaj mi diris al mi «antaŭ ol komenci la laboron, mi faros mallongan viziton al mia Roso.» Ĉu mi ĝenas vin? Ĉu mi agis bone? La ruĝeco de via vizaĝo vidigas konfuzon. Ĉu vi ŝanceliĝas? Vi ŝajnas lacigita.

—Ŝafino forperdiĝis kaj devigis min trakuri la tutan monton. Cetere, vi scias ke mi estas feliĉa... nur apud vi.

—Ha! ha! ha!... Jes; ŝi estas feliĉa nur apud vi... Mi povas certigi tion... kaj ankaŭ la pajla dometo... se ĝi scius paroli.

Ŝi estas feliĉa,

Ŝi estas kontenta,

Ŝi estas ravita apud vi;

Sed ino malriĉa,

Estonten atenta,

Allogas riĉulon al si.

—Ĉu vi aŭdis? Kion signifas tio?

—Ne atentu pri li. Li nur ĉikanas.

—Ho! Mi komprenas nun ĉion! Kiu estas tiu sinjoro? Belan amanton vi allogis! Vi ploras kaj ne respondas? Virino facile verŝas larimojn. Sed... atendu momenton. Mi tuj revenos al vi kaj montros ke oni ne trompas honestan viron senpune. Unue, vian amanton; poste, vin. Por io mi tenas falĉilon en la mano.

Post tiuj ĉi vortoj, li iris rekte al la ĉasisto, dum la fianĉino svenas kaj la knabo Lolo forkuras kiel vulpo. Sed baldaŭ li devis halti, ĉar sonis dolĉa sed firma voĉo diranta:

—He! Haltu! Por io mi tenas pafilon en la mano! Aŭskultu malsaĝa kaj kolerema vilaĝano! Vi plendas senkaŭze kaj insultas malprave vian fianĉinon, kies honesteko kaj nefleksebla fideleco meritas pli altan celon. Hazardo kunpremis niajn korpojn en malvasta kabaneto; sed sciu, besto ĵaluzema, ke niaj spiritoj-mi ĝin garantias-restis tiel puraj kaj ĉastaj...

—Mirinda sincereco! Ŝajnas al mi ke vi troas pri la valoro de la garantiaĵo. Permesu al mi diri ke via sempartieco estas iom duba.

—Se vi scius kiu mi estas, vi mem deklarus laŭte ke mi estas nekapabla atenci kontraŭ la honesteco de via fianĉino, kies rigidecon, cetere, mi ĵus konstatis, Naturo faris min tute sendanĝera kontraŭ la plej ŝatinda eco de la fraŭlaj virinoj.

»Dirinte tion, ŝi demetis la felan ĉapon, kiu kovris la kapon kaj parton de la vizaĝo, kaj alproksimiĝis al la vilaĝano, dirante «ĉu vi konas min?» Li, por respondo, nur ellasis la falĉilon teren, kaj per tremanta voĉo elmurmuris «fraŭlino Berta, mia mastridino, pardonu min».

—Diru nenion pri tiu ĉi sceno. Mi ne amas ke oni ĝenu min en la libera ĉasado, al kiu mi havas grandan inklinon.

»Roso, kiu baldaŭ devenis edzino de Francisko, neniam montris deziron sciigi pri tio kio okazis dum ŝia sveno, nek parolis iam pri sia *rigida fideleco* en la kabaneto.

»Mi ne povas plu stari ĉi tie, ĉar la suno devigas min supreniri; sed ofte, en nebulaj matejoj mi vagadas laŭlonge de tiu ĉi rivero, kaj la sunradioj igas min videbla. Ĉu vi venos aŭskulti miajn rakontojn?»

Ĉe la lastaj vortojn ĝi fariĝis pli kaj pli granda kaj travidebla, kaj post momento malaperis en la aero.

Ankoraŭ mi ne havis la eblon rekomenci la interrompitan konversacion, ĉar, kvankam mi ĉiumatene iras al sama loko, anstataŭ nebuleton lumigitan de la suno, mi vidas nur pluvegon, kiu devos tamen ĉesi antaŭ ol mi pricedos.

JUAN ZAVALA.

Sur la fundo.

*Ŝtono jetita en akvon, pereas
Sen posta signo, en nigra profundo;
Supraĵ' glatiĝas kiel la spegulo,
Kvankam la ŝtono kuŝas—sur la fundo.*

*En kor' frapita per mano amata,
Kvankam kruela estas ĝia vundo,—
Neniu signo vidiĝas ekstere,
Ĉar la doloro kuŝas—sur la fundo.*

*Kiam vi vidas fajron
El la amboso ŝprucanta,
Trulon kaj martelon, vikle,
En man' super kap' svinganta,
Kiam vi penegan sorton
Divenas el vizaĝŝvito,
Ho, klinu la frunton vian
Antaŭ tiu lacigito—
Ĉar popolo kaj laboro
Jen la fort' de l' mondo kaj gloro.*

El la pola originalo tradukis

HELENA HEMPEL.

Esperantigu la infanojn.

Mi havas dekjaran infanon, kiun mi instruas pri Esperanto, kaj kvankam li volonte studas siajn lecionojn, li antaŭ kelke da tagoj demandis, ĉu li havos ian utilon de tia laboro? Do li devigis min doni al li klarigojn, kiel respondon al lia demando, ĉar mi varmege deziras, ke li estu konvinkita pri tio ke la internacia lingvo baldaŭ estos necese-ga. Jen la rimarkoj, kiuj mi faris al li.

Ĉar vi estas ankoraŭ tre juna, estos pasin-

taj dudek jaroj, antaŭ kiam vi fariĝos sendependa viro, kaj povos mem konduki viajn proprajn aferojn. Dume Esperanto senhalte disvastiĝos en ĉiuj civilizitaj landoj, kaj tial, kiam vi estos atinginta plenaĝon, vi trovos, ke vi preskaŭ nesentebles akiris mirindan perilon, ebligantan al vi adresi leterojn al iu ajn komercisto, agento aŭ industriisto en la tuta mondo, ne dubante pri tio, ke li ĝin legos kaj kredeble respondos per la sama lingvo, komprenebla por ĉiuj.

Trairante fremdajn landojn, oni ne bezonos interpretiston, kio nuntempe estas granda malhelpo, malpermesanta afable kaj amikece interrilatiĝi kun alilanduloj. Eĉ oni trovos, almenaŭ en la ĉefurboj, teatrajn prezentadojn en Esperanto, kiuj ebligos al fremduloj plezure pasigi la tempon dum la vesperoj, post plenumo de la ĉiutaga tasko. Krom tio, oni ĉie renkontos samlingvanojn, kiuj lin akceptos des pli ĝentile, ju pli korekte kaj flue li parolas la internacian idiomon.

Aliparte, okazas tre ofte, ke ludas neenviindan rolon tiu, kiu uzas alinacian lingvon. Ekzemple, Anglo parolanta la francan, terure ridindigas sin, kaj la Francoj, loĝantaj en Anglujo, eĉ post longa restado ne povas ĝuste elparoli certajn anglajn literojn, kio ilin devigas ĉiumomente ripeti vortojn, pro nekompreno de la aŭskultantoj.

En ĉiuj nacioj oni vidas sur la scenejoj prezentadojn de fremduloj, kies stranga dirmaniero estas neelĉerpebla fonto de gajeco, mokado kaj senĉesaj ridoj. En bona societo, kompreneble, alilandanoj estas diplomate akceptataj, kaj neniu kuraĝus iel aludi iliajn nekorektaĵojn, sed tuj kiam ili foriĝis, ekridetas unue la pli junaj el la ĉeestantoj, kaj poste la ceteraj, ĝis fine la tuta kunvenintaro sprite priskribas kaj komentarias la plej notindajn strangaĵojn, kiujn ili rimarkis ĉe la foririntoj.

Ankaŭ la sento de humiliĝo estas neforigebla en tiaj okazoj, pro tio, ke eĉ plej mallerta junulaĉo, uzanta sian lingvon, pli ĝuste kaj facilvorte parolas, ol grandaĝa saĝulo eksterlanda, kiu eble longajn jarojn zorgeme kaj science ellernis tiun saman lingvon, kiun la junulaĉo tute senpene akiris de infaneco.

Certe la tempo venos, kiam estos modo paroli internacie en rondo de malsamlan-

duloj. Tiam la kampo de agado estos egala por ĉiuj, same kiel ĉe la ŝakiado, kaj tiuj plej alté staros, kiuj plej perfekte posedos la helpan lingvon.

Hodiaŭ oni povas certigi sen timo de eraro, ke la edukiteco de junulo estas duonplena, se li ne posedas almenaŭ unu fremdan idiomon: sed estas demando, kian li devas elekti? Hispano ĝenerale donas sian preferon al la franca, sed ĉu tio sufiĉos al li? Ĉu ne li pli ofte bezonos la anglan? Plej bone estas, se li lernus tri lingvojn, sed tiam li povos fari nenion alian dum sia juneco. Eĉ tiel, li ne sukcesus libere kaj ĝuste esprimi sian pensaron per iu ajn el la lernitaj lingvoj.

Esperanto do estas la solvo al tiu malnova kaj ĉiutage pli interesa problemo, ĉar nur malgranda kaj, ĉe la infanoj preskaŭ nesentebila laboro, ebligus la ĵus formiĝantan generacion venki la de jarcentoj ekzistantaj malfacilaĵojn, kiuj ĝis nun malhelpis la akiron de tia multevalora trezoro, kia estas tutmonda kompreniĝilo.

Kiom da fojoj kelkaj eminentaj profesoroj provis fari eksterlande konferencojn, tiomfoje ili konstatis malsukceson, pro tio, ke la aŭskultantaro nur duone aŭ entute ne komprenis la enhavon, kaj tial, neniu povas kontraŭ respondi, neniu provas naskigi diskutojn, sen kiuj neeble estas eltiri la sukcon, kiun la aŭskultantoj rajte esperas ĉerpi el tiaj konferencoj.

Ankaŭ kongresis tie kaj tie: inĝenieroj kuraĉistoj k. t. p. el diversaj nacioj, sed ĉiu kiu partoprenis en tiaj kunvenoj, ankoraŭ ridas kaj sian tutan vivon ridos je ili, kaj fine promesas, ke neniam plu li kongrese revidos siajn kolegojn.

Iom post iom la malnovaj vivantaj lingvoj estos forpuŝataj el la regiono de la scienco, laŭ tio, ke la landlimoj fariĝos malpli severaj, pli facile transireblaj. Jen ankaŭ la aerveturado antaŭdiras plenan malaperon de pasportoj, doganistoj kaj aliaj malhelpoj, kiuj de miloj da jaroj starigadas malamin-dajn barilojn, ofte nevenkeblajn, kontraŭ la interkonsento kaj kunfratiĝo de malsamlandanoj.

Kio okazos en frua estonteco, kiam la homoj povos ĉiutage viziti malsame parolantajn landojn? Ĉu ili devos lerni dekduon da lingvoj? Tute ne. Simple ĉiu ellernos unu

solan lingvon, krom sia gepatra, kaj tiel, la edukituloj en kiu ajn lando ĉiam havos taŭgan esprimilon por sin interkompreni.

Kiam Esperanto antaŭ dudek jaroj ekaperis, nur malmultaj kredis, ke ĝi staros, ĉu tial, ke ili sciis la malgajan historion de similaj, nun jam mortintaj projektoj, ĉu pro tio, ke la kontraŭuloj, ĉe ne trarigardis la novan gramatikon. Sed nun neniu povas dubi pri tio, ke Esperanto estos pli malpli baldaŭ, necesega komplemento de edukado. Unuj opinias, ke nur niaj pranepoj havos profiton de ĝi, kaj aliaj pensas, ke jam de nun penvaloras ĝin lerni. En mia parto mi kredas, ke nuntempaj infanoj devas esti instruataj pri Esperanto, ĉar oni jam de nun antaŭsentas, ke la kreskanta generacio vidos la mondon serioze esperantigitan.

Eble la pioniroj, kiuj, kiel mi, estas maturaj, eltiros nenian materiajn gajnojn de tio, ke ni studis la novan lingvon, sed kion ni perdis? Anstataŭ pasigi nian liberan tempon per kartludoj, aŭ sence babilante pri la politiko, ni dediĉis kelke da horoj al agrabla leĝado de esperantaj verkoj. Do ni nenion perdis, kontraŭe ni ĝuis kaj mi esperas, ke ankoraŭ longe ni ĝuos dolĉan kontentiĝon, vidante senĉesan progresadon kaj antaŭsentante baldaŭan triumfon de nia kara afero.

Kiel niaj gepatroj nur gustumis la aliformiĝon de la mondaj interrilatoj per la fervojoj, sed ili elĉerpis nemezureblan ĝojon, vidante ĝian konstruadon kaj divenante, la ŝanĝojn en la moroj de la venonta generacio, tiel ankaŭ la nunaj grandaĝaj esperantistoj ne ĝisvivos certe la epokon, kiam oni klasigos la homojn en du grupojn, nome, esperantistojn kaj nesciulojn; sed ni, pioniroj de la nova sento, ĉiutage ricevas entuziasmigan plezuron de tio, ke ni staras en la vicoj de la plej bela armeo, kiun vidis iam la homoj, batalintan kaj jam de nun venkantan la nesciicon kaj antaŭjuĝojn de la pasintaj jarcentoj, dum kiuj oni nur malklare perceptis, ke nesondebla profundegaĵo apartigas la homojn de la bestoj. Niaj pranepoj tiun plezuron ne havos. Ĝi apartenas al ni solaj, kaj ĝi estas riĉa kaj plena rekompenco al niaj—kiel certigas pli ol unu stultulo—sencelaj klopodoj.

J. ECHEVARRÍA.

Bilbao, Februaro 1910.

PASON AL PROGRESO!

Postlasinte polvajn nubojn, aŭtomobilo rulas en rapida kurado.

La raŭkan sonorilon oni aŭdas intertempe interrompita, ordona modo, ŝajnanta diri: Pason al progreso! Ĝi rapide supreniras kiel vapora fantomo. Ĝi mokas je mallongaj kurvoj. Ĝi furioze tranĉas la venton kiu ĝin batante ekscitas kaj malaperante kaj aperante en la kurvoj de la blanka vojo, ĝi foriras fierege, konvulsie kiel sarkasma monstro... Pason al progreso!

Vilaĝa ŝargĉaro kiu ĝin aŭdas alproksimiĝi, deflankiĝas; la bovjungo malpacientiĝas kaj la vilaĝano trankviligas ĝin per amemaj, karesaj voĉoj samtempe apogante sian dorson apud la jungilo. Tuj la monstro pasas rapide kvazaŭ vundita sovaĝa besto kaj la vilaĝano kaj bovcaro suferas resignacie la polvamasojn kaj gasolinan odoron.

La ŝargĉaro daŭrigas sian interrompitan marŝadon; ĝiaj radoj turniĝas malrapide, akrasonantaj; la bovcaro vojiras iom post iom, la vilaĝano fumas per sia kota pipo, kuragiĝas la bestojn per la bovpikilo kaj intertempe oni aŭdas lian voĉon *Aida!*

.....
Kio estas okazinta? Ĉe la eksupreniro de grandega deklivo oni vidas aŭtomobilon trenatan de du bovjungoj. Kelkaj individuoj strange vestitaj diskutas, babiladas kaj grimacas.

Ili piediras apud la vunditan gasolinan beston. La monstro de la rapideco kaj brueco, tiu kiu ĵus supreniris, malsupreniris kaj trairis kiel fulmo, marŝadas malrapide, silente, ne levante polvajn nubojn, paceme, ne kriante plu terure, ordone: Pason al progreso!

La aŭtomobilo lasas sin ruliĝi, submetiĝas. Vastkorpa kaj fortika vaska vilaĝano direktas la vojirantaron, fumas per sia kota pipo, elparolante intertempe tiun malnovan vorton: — *Aida! aida!*

Esperantigis
FRANCISCO DE BILBAO.

Erando 11/2/10.

KOREKTINDAĴOJN en lasta numero.

Folio	Kolono	Linio	Diris	Devas diri
114	2. ^a	43. ^a	neniun	nenian
119	2. ^a	24. ^a	FAVOJ	FABOJ
122	2. ^a	2. ^a	societon	komitato
122	2. ^a	3. ^a	kunmetas	konsistas

PACO

Al D-ro ZAMENHOF

*Pola najtingalo kantis
pacon, amon al homar'
kaj esperon ekvekiĝis
disrompinte lingvan bar'.*

—
*Nun, ni levu nian koron
de la majstro al la cel'
kaj kuraĝe bataladu
sub la nobla verda stel'.*

—
*Ni klopodu disvastigi
nian pacan batalil',
nian karan esperanton,
de nia stelo la bril'.*

—
*Enkonduki harmonion
inter ĉiuj la popol'
estu nia glora tasko
estu nia nobla rol'.*

—
*Antaŭen, antaŭen, fratoj!
supren, esperantistar'!
pola najtingal' anoncas
pacon, amon al homar'.*

RIĈARD SAŬREN.

Inter homoj kiuj forstudas la cerbon por senskrupule havigi al si facilajn vivrimedojn, estas vere notinda svisa vinmagazeno, kiu zorge kolektadis mortbiletojn de riĉuloj por sendi al liaj familioj tonelon da vino kune kun sekvanta letero:

«S-ro (ĉi tie la nomon de la mortinto): Mi »havas honoron kunsendi al vi la tonelon da »vino kiun vi al mi petis per letero antaŭ »kelkaj tagoj.—Ankaŭ mi entenas fakturon »kies valoron bonvolu sendi al mi.»

Preskaŭ ĉiuj familioj enfalis en la kaptilon kaj tiamaniere la vinmagazeno atingis grandajn profitojn de sia funebra elpensitaĵo.

EN LA TRAMVOJO

(El Gil Parrado en Madrid'a ilustrita revuo "Blanco y Negro").

Verkisto de la pasinta jarcento diris, ke la tramvojo estas la imago de perfekta societo en kiu ĉiuj feliĉe vivas, tial ke ili havas samajn rajtojn kaj samajn devigojn... Estas eble, sed... kiel staras tiu societo!

De kiam oni malpermesis fumi interne la tramveturiloj, la viroj neniel forlasas siajn sidejojn por ilin cedi al la virinoj, kredante ke ĉi tiuj estas kulpaj de la malpermeso... Ĉar la viroj ne povas spiri la fumon de sia cigaredo, ili almenaŭ forfumas... la ĝentilecon!

La infanoj pagas biletojn kaj bezonas mal multe da loko... Kiam tri aŭ kvar el ili eniras por sidigi, iu aŭ alia el la vojaĝantoj klopodas sidigi ilin apud si por pli oportune vojaĝadi... Estas unu el la maloftaj fojoj en kiu tiuj homoj sin alproprigas la evangeliajn vortojn: «Lasu la infanojn alproksimiĝi al mi!»

Loku vin ĉiam en la antaŭa plataĵo, kiu estas la lasta kiun la enspezisto vizitas... Tiamaniere vi evitos pagi biletojn de la amikoj, kaj ŝanĝe vi povas trovi pagita la vian.

Ĉu iu persono mankas por plenigi la veturilon? La Ĉiopova min liberu de dika virino, kvankam ŝi estos belega!

Estas multaj personoj kiuj sin ofendas se la tramo nur haltas en difinitaj lokoj sed ne kiam ili tion dezirus... Ili estas pravaj! La idealo estus ke ĝi nin lasu, ne nur en la portalo de nia domo, sed mem interne de nia hejmo.

La *carroza de tuti* nomas la italoj al la tramvojo... Pro tio ke ĝi apartenas al ĉiuj, ni devas elporti reciproke niajn malbonajn humorojn kaj niajn samkvalitajn odorojn. Tial, dum la homaro ne iom pliboniĝos, eĉ la plej frata spirito pensos pri propra kaleŝo kiam li suriras en la tramvojo.

Tiu, kiu estas urĝa, tiu forgesas eĉ siajn kompatemajn sentojn. Tial, kiam li vojaĝas sur tramplataĵo, kaj aŭdas haltalvokojn de iu piediranto, li ŝajngas distrita.

Oni malbone iras interne la tramo, ne tute bone for, sed malplibone oni estus sub la radoj, ĉu ne vere?

Esp-igis
VELASCO.

La krimuloj punitaj de si mem.

Tri viroj vojaĝadis kune. Ili trovis trezoron kaj ĝin lotumis inter ili. Ili daŭrigis la vojaĝon pritraktante la uzon farotan de sia riĉeco. Oni decidis festi la trovon per festeno kaj komisiis la plej junan iri en la urbon por aĉeti manĝaĵojn kaj trinkaĵojn.

Li efektive iris; kaj dum la irado diris al si mem:

— Jen mi estas riĉa, sed mi estus ankoraŭ pli, se mi estus estinta sola kiam ni trovis la trezoron. Tiuj du viroj forprenis al mi du trionojn de la trovaĵo. Ĉu ne estus maniero por ke mi posedu la tuton? Tio ĉi estas al mi facile farebla. Mi povos veneni la aĉetintajn provizaĵojn. Reveninte al ili, mi diros ke mi jam manĝis en la urbo. Ili manĝos konfide kaj nepre tuj mortos. Nun mi posedas nur la trionon kaj mi posedos poste la tutan riĉaĵon.

Dume, la du aliaj vojaĝantoj diris unu la alian.

— Tiu junulo venis malprofite nin, kuniĝinte kun ni. Ni estis devigataj dividi kun li la trovitan monon. Lia parto pligrandigus la niajn, kaj ni estus vere riĉaj, se ni... Li tuj revenos: bonajn ponardojn ni posedas.

La junulo revenis portante la venenitajn provizaĵojn; liaj kunvojaĝantoj mortigis lin; ili manĝis kaj trinkis avide kaj tuj mortis. Al neniu apartenis la trezoro.

El hispana lingvo tradukis,

F. REPÁRAZ.

En Hispanujo oni nomas haregulon al tiu homa estaĵo kiu estas tute senhara, kaj vosteĝulon al tiu kvarpedulo aŭ kvarmanulo kiu ne havas voston.

Ĉu tia aŭ alia antifrazo alilande ekzistas? Ni ĝoje de niaj legantoj aŭdus ion pri tio.

HISPANAJ TIPOJ

LA MADRIDINO

*Eta, fleksebla, gracia,
Pala kiel jasmefloro;
Okuloj nigraj kaj grandaj
Amo ĉiam en la koro.*

*Dum la sunoplenaj tagoj,
Kiam festas la Naturo,
Sub pluvad' de amaj vortoj
Iras vi al la taŭrkuro.*

*La stranga paradokso
En la via koro kuŝas:
Vin ne tremigas taŭrfesto,
Malfeliĉul' vin kortuŝas.*

*Prava estas popoldiro:
«De Madrido en ĉielon»
Ĉar vidante madridinon
Oni vidas amanĝelon.*

VIRGILIO.

KOMERCA RIGARDO

Vere hundan veteron nia regiono travivas de antaŭ du monatoj. Escepte neĝo, malofta nia vizitanto, la ceteraj elementoj (pluvegoj, hajloj, ventegoj) ĉiutage falas kaj furioze skuas kampojn, domojn, kaj kreskaĵojn. Do plenaeraj laboroj multe suferas pro tia situacio; nur la kampoj eble profitos ion de ĝi.

Kontraŭe, interne de nia lando oni plendas pri persista sekeco, kiu malebligas regulan ĝermadon de l' semoj.

Jen kutimataj detaloj de la plej komercaj artikoloj:

TRITIKOJ.—La prezoj tre solide staras en enlandaj vendejoj ĉar fremdan enportadon malebligas la nunaj tieaj kotizoj. Hodiaŭ kostas:

Ptojn 32 los 100 Kg. Kastilaja deveno
» 35 » » » Fremda id.

afrankitaj ĉe niaj magazenoj.

HORDEO.—Oni atendas 150 tonnojn de Maroka deveno kaj 250 de rusa deveno kiujn la ricevontoj proponas por:

Ptoj 22 la 100 Kg. la unuan
» 21,50 » » » duan.

La enlanda produktaĵo (andaluza deveno) kostas Ptoj 25 kaj oni vendas ĝin por 23/23,50.

FABOJ.—Malabundas en enlandaj vendejoj kaj fremda enportado nune estas nebla. Sekve la prezoj leviĝis ĝis 28/30 p-toj la 100 Kg.

MAIZO.—Anverpeno estas ja, iom de longe, preskaŭ la sola provizoro de niaj bezonoj de tiu ĉi greno; Liverpool kaj Hamburgo konstante subtenas pli altajn kotizojn. Nune oni aĉetas Platan devenon por F-koj 16,85 la 100 Kg. kaj vendas ĝin por 20,50/21 p-toj.

OLIVOLEO.—Dum la lasta monato la prezoj unue malkariĝis kaj poste denove plialtiĝis atingante hodiaŭ P-tojn 109 la 100 kg. por aĉetado kaj 115 por vendado.

GADO.—Albordiĝis dum la monato Februaro sekvantaj vaporŝipoj:

Sevilla de Kristiansund
Elvira kaj Donata.. » Liverpool
Ville de Rochefort . » Bordeaux
Salamanca.... » Kristiansund
Soto » Hamburgo
Les Fils Conseil.... » Bordeaux

elŝarĝante proksimume 40 milojn da pakajoj (2.000 tonnojn) de tiu ĉi sekigita fiŝo, kiujn baldaŭ ensorbis interlandaj aĉetantoj, ĉar la vendado estas tre grava en tiu ĉi epoko de l' jaro.

Oni kotizas:

	Ĉetado	Vendado
Norvegan Kosta'n	F koj 47	P toj 64
Id. Zarbo'n	» 30	» 48
Islandian (angla sekigo)	» 35	» 54
Skotlandan (» »)	» 37	» 58
Bankon (franca »)	» 26	» 43

la 50 Kg. La prezinterspacoj pleniĝas per monŝanĝo, doganimpostoj kaj profito de l'vendistoj.

VINOJ.—Post granda eksportado kvieteco alvenis kaj sekvigis malkarecon. Tamen, ĉar la enhavaĵoj ne estas gravaj, oni esperas rekariĝon tuj kiam la movado rekomencos.

Dume oni kotizas:

P tojn 21 la hektolitron Alikanta deveno
» 22 » » Manĉa »

La eksportado tra tiu ĉi haveno de la komenco de l' jaro atingas 1.700 tonnojn, la plimulto por la Antiljoj kaj Sudameriko.

FERMINERALOJ.—Dum tiu ĉi jaro oni

eksportis ĝis nun 570 milojn da tonnoj Aktivan vendadon oni efektivigas je la sekvantaj prezoj:

Rubio	1. ^a kvalito.....	11	Ŝilingoj	6	pencoj	} por angla tonno live- roto ĉi tie.
»	2. ^a »	11	»	—	»	
Karbonato	1. ^a »	13	»	9	»	
»	2. ^a »	12	»	9	»	

V.

LA MIRAKLO

Kiam mi alvenis la Ermitejon de Sedmiozema, mi kuntrafis la preparojn por akcepti, per solena procesio, la miraklan statuon de la Sankta Virgulino revenantan de la urbo.

Staranta sur monteto, mi povis ĉirkaŭrigardi la tutan ĉirkaŭaĵon. La popolamaso, kvazaŭ nigraj torentoj, alfluis la monaĥejan parolokon, baraktante kaj amasiĝante kontraŭ la muroj.

La suno estis subiranta kaj ĝiaj aŭtunaj rsdioj estis ege ruĝkoloraj.

La sonoriloj tremmoviĝis kiel birdoj pretaj ekflugi post kantado de siaj kantoj, la malkovritaj kapoj de la popolamaso kolorigitaj per la sunaj radioj elrigardis kiel klinitaj dikaj amapoloj.

En la Monaĥeja parolejo oni atendis okazontan miraklon. Kuŝis en malgranda puŝveturilo, senmova kaj malgrasa infanino, kun vakskolora vizaĝo kaj okuloj ĉuonfermitaj.

La tuta vivo de la malsanulino estis rifuĝinta en la tremojn de ŝiaj longaj okulharoj.

Apud ŝi staris la patro, altkreska, senhara, kun griza barbo kaj granda nazo, kaj ŝia patrino vastkorpa virino.

La popolamaso alproksimiĝis rigardadante la malsanulinon, dum la patro diris al ĝi, per modera voĉo, skuante la kapon:

—Mi petas al vi bonaj kristanoj preĝu por mia filino. Pasis jam kvar jaroj de kiam ŝi perdis la kapablecon uzi siajn manojn kaj piedojn. Petu al la Sankta Virgulino ke ŝi nin helpu. Dio rekompencos viajn sanktajn preĝojn... Helpu nin por liberigi nin je nia malfeliĉo.

Malrapide, peze, venis suprenirante la procesio tra la kruta vojo de l' monto.

Ĝi kvazaŭis maran ondon kronitan per

ruĝa ŝaumo, pro la oraj standardoj kiuj disjetis brilegantajn rebrilojn.

Simile al fajra birdo, balanciĝis kaj superŝoviĝis la statuo de la Sankta Virgulino, iluminita de la radioj de l' suno.

Grandega sopiro leviĝis el la popolo; miloj da voĉoj kantadis: Propetu por ni, patrino de l' Dio!

Mallaŭtaj krioj de tempo al tempo, interrompis la letanion.

—Marŝu! Antaŭeniru! Pli rapide!

Mi sentis min izolita. Ĉio tio ŝajnis al mi bedaŭrinda eraro, plena malespero, preme-ganta atendo de ia favoro.

La procesio alvenis apud min; la vizaĝoj estis kovritaj de polvo; la ŝvito trafluis la vangojn; la spirado estis malfacila kaj strangedaj la rigardoj.

Ŝajnis ke la amaso vidas jam nenion; ĉiuj kunpuŝiĝis unuj la aliajn kaj balanciĝis.

Granda kompatemo kaj bedaŭro doloris min, pro la fido pleniganta la tutan ĉirkaŭaĵon.

Kaj la homa torento daŭre disradis.

Forta kaj superekscitita krio, sed malgaja kaj simila al riproĉo tranĉis la aeron.

—Ĝoju, ĝoju!

—Poste denove ili kriegis.

Antaŭeniru, antaŭeniru!

En polva nubo ŝoviĝis centoj da nigritaj vizaĝoj, miloj da okuloj similaj al la steloj de la lakta vojo. Ĉiuj tiuj okuloj estis kvazaŭ brilantaj fajreroj de unu sola animo kiu senpacience atendis nesciatan feliĉon.

La popolamaso ŝajnis unukorpa; ĝi kunpremis sin kunprenante manojn kaj rapide marŝadis; oni povis kredi ke ili estas longe vojaĝantaj kaj pretaj por marŝi senhalte ĝis la fino.

Mi iris al la popolo, malsupreniris la monton antaŭ ĝi, kaj sekvis ĝin plenpulme kantante:

—Ĝoju ĝoju, forto benata de ĉiuj fortoj!

Mi estis envolvita, ĉirkaŭita kaj trenata de la amaso kaj mi restis neniigita en la densumo de bruligaj spiraĵoj, Jam ne estis la tero tio, kion mi havis sub miaj piedoj; eĉ mi mem plu ne ekzistis; ne ekzistis la tempo, sed nur grandega feliĉo kiel tiu de la ĉielo.

Mi estis flamo de ardanta fido; mi estis granda kaj humila, simila al ĉiuj, kiuj ĉirkaŭis min en tia ĝenerala homturniĝo.

—Antaŭenirul Pli rapidel...

Kaj la popolo tute preta por trapasi ĉiujn barilojn kaj abismojn, ĉiujn sanceliĝojn kaj nekonatajn terurojn, flugadis sur la tero kun nekontraŭbatalebla forto.

Subite ĉio haltis antaŭ mi, kaj post bataleto mi troviĝis apud la puŝveturilo de la malsanulino.

Ĉie oni kriis kaj murmuretis:

—Te Deum! Te Deum!

La superekscito grandigis ĝis paroksismo, ĉiuj puŝis la ĉareton kaj la kapo de la junulino moviĝis senkonscie; ŝiaj grandaj okuloj havis timigitan esprimon. Multaj rigardoj jetis ĝian fluaĵon sur la malsanulinon, centoj da fortoj kuncelis ŝian malfortikan korpon; elfluis eldezirego vidi la malfeliĉan stariĝantan el la lito de doloro.

Ankaŭ mi jetis al ŝi profundan rigardon kaj absolute volis ke ŝi leviĝu, ne por ŝia aŭ mia kontentiĝo, sed por alia afero kompare al kiu ni estas kvazaŭ birdetaĵaj plumoj en brulado.

Kvazaŭ bonfaranta pluvo falanta sur la soifantan teron, la popolo saturis per sia forto, la senfortan korpon de la junulino kaj ekkriis:

—Leviĝu! Leviĝu! Ne timu, infanino, levu la brakojn! Levu ilin sentime! Leviĝu malsanulino! Levu la brakojn!

Centoj da steloj ekbrilis en la animo de la malsanulino; rozkoloraj ombroj trakuris ŝiajn palajn vangojn; ŝiaj mirigitaj okuloj plilarĝiĝis.

Malrapide dismovante la ŝultrojn, la junulino obeeme levis ŝiajn tremantajn manojn kaj ilin etendis antaŭen.

Kun la lipoj duonfermitaj, ŝi ŝirnis birdeto ekfluganta ĝian unuan flugadon.

Subite ĉirkaŭ mi, kaj ĉie, leviĝis malklara ekkrio. La popolo ekstremita ekkrianta:

—Helpu ŝin! stariĝu! stariĝu infanino! Levu ŝin!

Ni levis la junulinon, subtenis ŝin malforte, dum ŝi apogis ŝiajn piedojn sur la planko. Ŝi kliniĝis kvazaŭ trunketo skuita de la vento kaj kriis.

—Ah! Dio! Miaj amikoj! Benata Sankta Virgulino! Ah!

—Marŝu! Kriegis miloj da voĉoj.—Vojiru,

Mi memoras polvohavan vizaĝon, tute malsekigitan per larmoj kaj ŝvito; tra la yua-

lo de perloj brilis tiu grandega kaj miriga forto: la fido, kiu kreskas en ĝia propra forto, kredas miraklojn.

La knabino malrapide vojiris meze de ni, ŝia resanigita korpo konfide kuniĝis kun la amaso, ŝi ridetis kaj diris:

—Lasu min, mi volas iri sola.

Momenton ŝi haltis, ŝanceliĝis kaj ekmarŝis,

Ŝi marŝis kvazaŭ ŝi ne estus certa de sia movo, sed ŝi marŝis.

Ŝi vidadis ankoraŭ iom timema, simila al infano; kaj la popolamaso, kiu ŝin ĉirkaŭis estis tiel radianta kaj amema kiel junulo.

La junulino ekstremita kun la manoj etenditaj antaŭen, kaj ŝajnis ke ŝi apogadis sin en la aero, saturita de la popola forto, subtenita de centoj da helaj radioj.

Ŝi malaperis post la kradopordoj de la Monaĥejo; mi rekonsciiĝis kaj rigardis la spektaklon, kiu min ĉirkaŭis.

Ĝi estis festo; la sonorilaj sonoj, la bruo de la fortaj voĉoj de la popolo, la bruego de la popolaj ĝojoj plenigis la spacon. En la ĉielo la sunkuŝiĝo rebrilis, envolvante la lagon en purpuraj relumoj.

Homo pasanta apud mi, ridetante, min demandis:

—Ĉu vi vidis?

Mi lin ĉirkaŭpremis, kiel fraton kiun oni renkontas post longa foresto.

Kaj nenion plu ni bezonis diri nin reciproke.

Ni disiris ridetante, senparole.

MAKSIMO GORKIJ.

El hispana lingvo tradukis,

TOMÁS ARAMBILET.

Deusto 18an Decembron 1909an.

BIBLIOGRAFIO

En tiu ĉi fako ni publikigas raporton pri la verkoj senditaj al ni duekzemplere.

LA SUPUJO.—Unuakta komedio de Ernest d'Hervilly, tradukita de Sam. Meyer.

Flanke lasante la intereson de la verko kiel komedio, la ridindajn scenojn de S-rino Spoon kaj S-ro. de Honduras, kaj rilatante nur pri la traduko, elegante facila, kiun S ro

Meyer faris, ni estas devigataj rekomendi «La supujon» al niaj legantoj, en la certeco ke ili pasigos agrablan momenton kaj pli grandigos samtempe iliajn konojn de Esperanto.

LA BARBIRO DE SEVILLA. — Komedio en kvar aktoj, de Beaumarchais, tradukita el la franca lingvo de Sam. Meyer.

Ĉu estas persono sur la mondo kiu ne legisialingve tiun spritan komedion? aŭ ne vidis la famekonatan operon baptitan per la sama nomo? Ĉu estas mortemulo ne konanta la ruzaĵajn procedojn de Figaro por liberigi la amatinon de la Grafo el la avaraj manoj de Bartolo? Kaj fine ĉu ekzistas esperantisto kiu dubas pri la majstreco de Sro. Meyer kiel tradukinto? Nea respondo devas sekvi al tiu demando.

Vere aĉetindaj estas ambaŭ uerkoj, kiujn vi povas mendi ĉe la «Librairie de l'Esperanto» 15, Rue Montmartre, 15, Paris.

FERVOJO TRA L' ANDOJ. — La montaron de l' Andoj, tiun gigantan spinon de Sudameriko, kies suproj atingas 7000 metrojn da alteco kaj kies transiron oni konsideris antaŭ nelonge vere danĝeran, la fervojo, post malmulte da tempo, venkos, ĉar nur mankas du kilometroj da tunelo por fini la linion kiu kunigos la Ĉilian ĉefurbon kun tiu de la Argentino.

La plej alta parto de la nova vojo mezuras 3810 metrojn.

Kiam regula movado estos starigita, la vojaĝantoj bezonos 10 tagojn malpli ol nune por alveni en Europon de Ĉilio, ĉar la vojiro inter Valparaiso kaj Buenosaires tra la Magallanes'a markolo daŭras 13 tagojn, dum per tia fervojo nur postulos tri.

Laŭ nova leĝo aprobita de Franca Parlamento oni starigas maljunulan pension por tieaj laboristoj ĝuotan de post la 65^a jaro de ilia vivo. Por 9 frankoj elspezitaj jare de la viroj dum 30 jaroj kaj 6 de la virinoj, ili enspezos 414 kaj 270 frankojn ankaŭ ĉiujare je ilia alveno al la dirita aĝo. Al tiu celo la mastroj kaj la registaro kunhelpas en la bezonata proporcio.

DIVERSAJ SCIIGOJ

LA REDAKCIA KOMITATO BEDAŭras ke nia samideano S.^o Eskivela sentas sin ofendita de la artikolo enpresita en la 7.^a numero, titolata «Barbaraĵoj», kies imitinda stilo ne prosperas pravigi ĝian videblan partiecon. Ni promesas prizorgi en la estonto.

PRO NESUFICA SPACO EN LA NUNA numero ni ne povas publikigi diversajn manuskriptojn senditajn de estimataj kunlaborantoj. Ili aperos en venontaj.

NEKROLOGIO. — M. Henri Pellat, profesoro de fiziko, kaj membro de la Sorbonne'a Grupo, en Parizo, mortis. Membro de la komitato de «Scienca Asocio», li verkis originalajn tre interesajn artikolojn en «Internacia Scienca Revuo», tre ŝatatajn de la scienca esperantista mondo. Ripozu pace nia eminenta frato.

UNUA KONGRESO DE KATOLIKOJ ESPERANTISTAJ. — Ĝi okazos en Parizo, en la proksima paskotempo (30 marto ĝis 3.^a Aprilo 1910). La kongreskarto kostas 1 S. m. kaj estas mendebla ĉu ĉe Sinjorino de Menil, 46, Boulevard Magenta, Paris, ĉu ĉe la Redaktoro de «Espero Katolika» S-ro Claudius Cola, 10, rue Beranger, Paris.

GRAVA ALVOKO! — Sub la Deputata Protektado kaj tiu de la Urbokonsilantaro, fondiĝis en Barcelono «Sociala Muzeo», kies inaŭguracio okazos la proksiman monaton, Aprilo, 1910.^a, per adekvata Ekspozicio.

Ni permesas al ni konfidi, ke niaj samideanoj montros iliajn bonfaremajn sentojn, profitante tian oportunaĵon por pruvi, ke Esperanto estas io praktika, ne utopio, kaj bonvolos sendi kiel eble plej baldaŭ kaj multe: desegnojn, verkojn, laborilojn, ĉiuspecajn maŝinojn, k. t. p., rilate al la celo de la nomita Muzeo, per kio ili kunhelpas la meritindan agadon pri plibonigo de la laboristaro, ĉefa kaj sola deziro de la nova antaŭdirita institucio.

Pri ĉiuj informoj, sciigoj kaj sendaĵoj sin turni al: Moŝta S-ro Henriko Prat de la Riva, Prezidanto de la Muzeo kaj de la Deputatejo, Barcelono, Hispanujo.

ESPERANTA EDZIĜO. — La 11^{an} de Oktobro de la ĵus pasinta jaro, okazis en Edimburgo la geedziĝo de S-ro Levis Bowyer

Laŭders, el Filadelfio (Usono) kaj Fno. Jean Smith Munro, animo de la Edimburga Grupo.

Ili konatiĝis en Skotlando dum Kongreso kiu tie okazis la Junian monaton 1908^a sin revidante en Dresdeno dum la kvara. Post kongresa ekskurso, ili fianĉiniĝis en Berlino.

Geedzigitaj en la preĝejo de Sankta Jakobo, belflore ornamita, antaŭ granda amaso de geesperantistoj, ĉiuj invititoj, pli ol 70, post la religia solenego, estis akceptataj en la hejmo de Sro. Mund, kiu flirtigis ekstere de sia domo la amerikan kaj esperantan flagojn, regalante la gastojn per grava festeno kaj koncerto. Post entuziasmo plenaj toasty kaj kantoj (ĉio Esperante) foriris la novgeedzoj en aŭtomobilo ornamita per la verda standardo, meze de pluvego de «konfettoj» kun ĉies bondeziroj por ilia feliĉa estonteco, al kiuj ni nin permesas aldoni la niajn, tre sincerajn. Esperantistinoj kaj... esperantistoj de Bilbao: Jen imitinda ekzemplo!

«BEDAŬRINDA» MALOFTA KAJ SAMTEMPE «AGRABLA» OKAZINTAĴO.

La 15^{an} Julio de la pasinta jaro je la oka matene estis kondukata sur portilo al tiuĉi Hospitalo pro vasta kaj gravega vundo kaŭzita de la radoj de minvagono nia kara kaj fervora samideano Viktorino Martin So to el la Grupo de La Arboleda.

De la momento kiam liaj kamaradoj diris al mi kiu estis la vundito, mi faris post atenta ekzameno de la vundo mian eblon por konsoli la malfeliĉulon, kies vundo efektive estis tre grava kaŭze de la troa sangperdo kaj dispecigo de la supra regiono de l'maldekstra piedo. Kiel ni vidas, ĝis nun la okazintaĵo estas *bedaŭrinda*.

Deflankigante aliajn malpli gravajn vunditojn, mi iris rekte helpi nian malfeliĉan samcelanon kaj dum la kuracado, malgraŭ ke ĝi estis tre dolora kaj longa, li elĵetis eĉ unu doloresprimon. Mi kredas ke multe kunhelpis al tio la fakto ke nia samlingvano vidis sin ĉirkaŭita de kvar fidelaj Esperantistoj tial ke la *Kuracisto* (1) la *praktikanto*, la *malsanulisto* kaj eĉ la *pordisto* de la malsanulejo, ĉiuj klopodegis je la fino kiel eble

(1) La anonima raportanto, S-roj M. Sagredo S. Carro, A. Carús, respektive.

plej baldaŭ kaj plibone kuracadon tiel terurran. Ĉu la ĉesto de la diritaj kungrupanoj ĉirkaŭante kuracante kaj konsolante alian grave vunditan ne estas en Esperantujo okazintaĵo hodiaŭ *malofta*?

Feliĉe nia kara verdstelano, post grandegaj suferadoj, forlasis hieraŭ la Hospitalon tute resanigita (kaj nature kontenta) preta daŭrigi la Esp. lernadon. Ĉu tio ĉi ne estas tre *agrabla*?

VEROJ KAJ MENSOGOJ

Nova ministreja pordisto anstataŭas malnovan, ĝuste tiam kiam bela junulino sin prezentas demandante:

—Ĉi oni povas vidi lian ministran moŝton?

—Ho!—gentile respondas la pordisto—lia ministra moŝto ĉiam estas videbla por ĉarmaj virinoj!

—Mi tre ĝojas aŭdi tion! Nu, volu diri al li, ke lia edzino deziras lin paroli!

:

Verko en du volumoj:

La reĝo de Prusujo havis kiel adjutanton la kolonelon Malachwski kies malabundajn vivrimedojn tre bone konis la reĝo. Unu fojon, dezirante lin monhelpi, sendis al li paperujon kiu similis libron entenantan 500 tale-rojn (2.000 frankojn proksimume).

Post kelke da tempo li renkontis la oficon kaj demandis:

—Ĉi kia ŝajnis al vi la verko kiun mi vin donacis?

—Sinjoro, respondis la oficiro, ĝi estis tiel interesa, ke mi senpacience atendas la duan volumon.

Aŭdante tian ruzaĵon, la reĝo ridetis, kaj je la naskiĝa datreveno de sia adjutanto, sendis al li paperujon tute egalan al la antaŭa kun la sekvanta epigrafo:

Dua kaj lasta volumo.

:

Avarulo almozdonis, kaj diras al almozo:

—Prenu kvin centimojn kaj redonu al mi tri.

—Mi ilin ne havas, sinjoro.

—Bone, mi jam donos al vi alifoje, diris la

avarulo reenposigante la monon, dum la almozulo malĝoje ekriis:

—Ho, mia Dio! Eĉ por almozpeti oni bezonas havi monon!

Flatema profesoro ĉe leciono de Historio demandis al princo sia lernanto.

—Kion via princa moŝto povas diri al mi pri la Imperiestro Kaligulo?

La princo silentas.

—Perfekte, sinjoro; ju malpli oni parolos pri tiu imperiestro, despli bone.

Frumatureco:

Instruistino demandis al knabineto:

—Kion faris izraelidoj ĵuselirintaj de la Ruĝa Maro?

—Sekigi sin.

En ia amika kunveno sinjoro eltiras el sia cigarujo kaj ekbruligas grandan multekostan cigaron.

Senhontulo, kiu neniam mankas en tiaj kunvenoj, demandis al li:

—Ĉu vi ne havas iun pli?

Kaj estis la respondo:

—Ne, mi havas iun malpli.

—Mi kutimas puni mian korpon ne donante al ĝi tion kion ĝi petas. Ĉu ĝi petas al mi merizon? Mi donas al ĝi kotletojn. Ĉu ĝi deziras engluti ovaĵon? Mi enmetas al ĝi ŝinkon.

—Kaj se ĝi volas trinki vinon?

—Mi tion donas al ĝi, ĉar ankaŭ ne estas konvene troigi la punon.

—En *plej videblan* lokon de la montrejo vi devas meti mian unuan verkon.

Kaj respondas la mastro de la librejo:

—Mi, pri via deziro, tute konsentos;

sed, kia estas la nomo de via verko?

—Ĉu vi nomon demandas?

Jen: *Modesteco!*

Mastrino al sia servistino:

—Ĉu vi alportis la florojn kiujn mi devos meti sur mian hararon?

—Jes, sinjorino, sed mi ne povas trovi la hararon sur kiun vi devos meti la florojn.

Doktoro M., akceptis malsanulon, homo dumetrojn alta kaj tre dika, kiu eniras en la ĉambron.

—Kion vi sentas? demandas la kuracisto.

—Mi sentas ke mi perdis la apetiton, per tondra voĉo respondis la dikulo.

—Ho Dio! malfeliĉa tiu kiu ĝin renkontos! aldonis la kuracisto.

Vojaĝanto gastis en hotelo kie oni donis al li por manĝi tro s. kankajsensukan ĥokidon.

Tial, la gasto demandis al la servanto:

—Antaŭ kiom longe estis rostita tiu ĉi birdo?

—Mi nenion povas diri al vi pri tio, respondis la kelnero, ĉar mi servas ĉi tie nur de 15 tagoj.

—Kie oni kaptas la krabojn? demandis sinjorino al unu el la plej elegantaj dandoj.

—Mi tion certe ne scias; sed ĉu ili ne estas ruĝaj?

—Sendube.

—Tiam kompreneble ili estas kaptitaj en la Ruĝa Maro.

—Kio estas anĝelo?—demandas infano patrinjon la sian.

—La estaĵo fluganta per blankaj flugiloj tra ĉielo dia.

—Sed hieraŭ la patro alnomis anĝelon, servistinon nian;

ĉu ankaŭ ŝi flugas?

—Ŝi ankoraŭ ne flugas...

sed flugos tuj kiam

—post preni la ĝustan kalkulon—si aranĝos valison la sian!

Vanta anfitriono diris al iu invitito.

—Kia vi trovas tiun ĉi vinon?

—Sufiĉe malbona, mia kara.

—Kiel? Mi kredas ke ĝi estas tute bona por manĝi!

—Por manĝi... mi ne scias; sed por trinki ĝi ja estas abomeninda.

—Edzino al sia edzo:

—Bone, vi ja alvenas ebria.

—El kio vi tion konjektas?

—Ĉar ĉiam kiam vi drinkas, vi eldonas saman voĉon kvazaŭ vi estus parolanta tra telefono.

Al unu el siaj luantoj kiu ne povas pagi la luprezon dum kelkaj monatoj diris la domastro:

—Por doni al vi pruvon de mia ĝentileco kaj malavareco, mi decidis forgesi la duonon de via ŝuldo.

—Miavice respondis la ŝuldanto, mi ne deziras esti malpli ĝentila ol vi, kaj mi decidis forgesi la alian duonon.

Studento al kiu latinaj tradukoj multe enuigas, sin prezentas fari ekzercojn por atingi abiturientan titolon.

—Kia estis la supereco kiun la romanoj havas super ni? oni demandas al li.

Kaj li sopirante respondas:

—Lia supereco konsistas en tio, ke ili ne bezonis traduki la «Komentariojn» el Julio Cezaro.

Esperantigis
VELASCO.

Anoncoj

NOMARO

de Sinjoroj dezirantaj korespondadi kun alilandanoj

La prezo por unu enskribiĝo en tiu ĉi fako estas 0,50 Pesetoj (2 spescentoj). La literoj P. K. montras la deziron interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn; P. M. poŝtmarkojn, kaj L. leterojn.

S-ro. GEO. H. APPLETON.—LYNCHBURG, Virginia; U. S. A. deziras korespondad esperante per kartoj aŭ leteroj. Ĉiam respondos tuj.

S-ro. JOHN A. RAMSTEAD, R. F. D. n.º 2, Spokane, Wash. U. S. A. (Estados Unidos) P. K. P. M. Ĉiam respondos.

Subdelegito de U. E. A., V. ECHARANDIO (19 jara) Baracaldo Vizcaya (Hispa-

nujo) deziras korespondi kun eksterlandaj geesperantistoj kondiĉe ke oni sendu al li unu e siajn portretojn. Tre volonte tiam li respondos.

S-ro. JOSÉ VENTURA, Str. ge Watt n.º 31, Tarrasa (Barcelono, Hispanlando) deziras korespondadi kun ĉiulandaj geesperantistoj. Ĉiam kaj akurate li respondos. P. K.

S-ro. TOMÁS LÓPEZ ĉe la Grupo Esperantista de Bilbao korespondos per ilustritaj. P. K.

“LA BELGA”

Granda magazeno de enlandaj kaj fremdaj murpaperoj

DE

 GUILLERMO PUJOL 

Specialeco je modernistaj desegnoj.

Travideblaj paperoj por vitroj.

STRATO FUEROS (apud Ascao)--BILBAO

SENKONKURENCAJ PREZOJ

NOVA SENTO

ORGANO DE LA VASKA ESPERANTISTARO

ABONPREZO

POR UNU JARO
Ptoj S. m

En Hispanujo. 1,75 0,70
En Fremdlando 2,25 0,90

ANONCPREZO

POR UNU NUMERO
Ptoj S. m

1/2 paĝo 10 4
1/4 » 5 2
1/8 » 2,50 1

Malkaraj anoncoj por korespondado, 0,50 Pesetojn (2 spescentojn).

Ni akceptas respondkuponojn kaj ĉiulandajn poŝtmarkojn.

La Redakcia Komitato, reservas al si la rajton korekti, akcepti aŭ malakcepti la manuskriptojn.

Diskutoj pri politikaj kaj religiaj aferoj estas malpermesitaj en tiu ĉi ĵurnalo.

NOVA SENTO estas aĉetebla poekzemplere ĉe la Esperanto-Oficejo, librejo de S-ro Fuentes, Bidebarrieta 9, Bilbao.